


BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 16.

Julio - Aŭgusto 1954

Aperas laŭbezone

František O M E L K A k v i n d e k j a r a .

La aŭtoro de jam fama esperantlingva libro "La alaska stafeto kaj Kaptitoj de la glacirokoj" fariĝis kvindekjarulo.

Li naskiĝis la 19an de aŭgusto 1904 en Staré Město-Uh.Hradiště. Laŭprofesie li estas faka instruisto por ĉeĥa lingvo. Jam en siaj studjaroj li okupiĝis per verkado de simplaj rakontoj. Centoj da ili aperis poste en diversaj ĉeĥaj revuoj kaj gazetoj por gejunularo, al kiu li dediĉis plene sian verkistan talenton.

Esperantisto li fariĝis en la jaro 1932 en kurso, kiun tiujare aranĝis por siaj membroj la Instruista societo "Komenský" en Uh.Hradiště.

František Omelka tutanime sin donis al la Esperanta ideo. Tuj de komence li profunde ekstudis la lingvon kaj fariĝis ĝia batalpreta defendanto. Li fondis aŭ estis helpopreta kunfondinto de kelkaj E-kluboj, kies prezidanto aŭ funkciulo li estis dum pluraj jaroj. Krom tio li gvidis multajn E-kursojn, precipe en lernejoj. Kompreneble, ke li, kiel lerta verkisto kun sentema koro por ĉiuj noblaj ideoj, dekomence pensis kiel eble plej efike utiligi sian lingvan scion por literaturo. Unue li tradukadis Esp. prozon en la ĉeĥan lingvon, kiun li sukcese publikadis en ĉeĥa gazetaro. Poste li komencis verki mem en Esperanto. Kelkaj liaj aventuroplenaj rakontoj aperis en antaŭmilita Heroldo.

Kio plej multe altiras lian atenton kaj al kio li daŭre dediĉas plej multe da tempo estas la verkado por gejunularo. El lia plumo aperis en ĉeĥa lingvo kelkaj tre interesaj kaj de junularo tre ŝatataj libroj.

Libroforme en Esperanto aperis liaj "Aventuroj de Antonio". El ĉiuj liaj ĝis nunaj verkoj plej famiĝis lia "Stafeto". Ĝi aperis krom en la ĉeĥa jam dufoje en la germana lingvo. Laŭ ĝia Esperanta eldono en Anglujo aperos baldaŭ ĝia traduko en Islando en tiea hejma lingvo, kie la rakonto estis kun granda sukceso elsendata radie. En la Stafeto donis Omelka indan formon de ideoj, kiuj estas fundaj karakterizaĵoj de homo bona kaj ĝis ekstremo sinoferema por celoj plej humanecaj. Lia rakontado delikate rememorigas la subtilajn vibrojn de nobla animo kaj kristale pura homa karaktero.

Kvankam la stilo de ĉiuj verkoj de Omelka estas tre simpla, ĝi scias forte kateni la junan leganton. Estas tial, ĉar Omelka estas bonega observanto kaj serĉanto de estetikaj valoroj, kiujn li scias majstre poluri per sia rakontista talento. Li estas entuziasma, fervora, modesta kaj delikatsenta homo, ege laborema, kies juĝo kaj pedagogiaj kvalitoj ĉiam trafas senerare.

Fr. Omelka estas nun en la plej promesdona periodo de sia vivo. La ĉeĥa porjunulara literaturo, en kiu li atingis jam certajn sukcesojn, povas ricevi de li ankoraŭ pliajn gravajn verkojn. (Nova lia romano estas prespreta.)

Sed ankoraŭ al ni Esperantistoj li ŝuldas multon.

Tial okaze de lia ora jubileo ni ĉiuj kore bondeziras!

D.B.

ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo Junularo kunvenas samloke kaj samtage je la 19a horo.

Venontaj programoj:

- 14.7.1954 :Dolfa Bartošík: Kulturaj rilatoj inter ĈSR ka Nederlando. II.parto.
- 21.7. :Ota Ginz: Nekredebla kaj tamen vera.
- 28.7. :Jaroslav Šustr: Iom pri Gvatemalo kaj cetera Mezameriko.
- 4.8. :Jan Zemek: Brahmanaj profundaj veroj. Eltiroj el orig.bramana let.
- 11.8. :Josef Vítek: Miaj nunjaraj impresoj el Doksy.
- 17.8. :Inĝ. Jar.Růžička: Interesaĵoj el populara matematiko (ĉeĥe)
- 24.8. :Filma vespero - Antonín Slanina.
- 31.8. :MUDr. Frant.Macholda: Kion ĉiu sciu pri tuberkulozo (ĉeĥe)
- 7.9. :Josef Vítek: Antaŭ sep jaroj en Danlando (sept.-oktobro 1947)

- -

Mortis nova samideano.

Jiří Bruthans, 19jara dogana oficisto, kiu esperantiĝis en vigla Junularo de Esperantista Klubo en Praha, dronis en Vltava banante sin la 20an de junio 1954. La kremacio okazis la 8an de julio en Praha Motol. Al liaj afliktitaj gepatroj, gefratoj kaj parenkaro ni esprimas nian profundan kunsenton de doloro!

ESPERANTISTA KLUBO DE PRAHA

- -

APERIS NOVA LERNOLIBRO:

Julie Šupichová: Esperanto v kostce.

20 ciklostilitaj kvartpaĝoj. Eldonis EK ĉe OB 2 en Praha. Prezo 5,60 afrank. Simpatia verko, kiu en 134 punktoj elĉerpas gramatikajn kaj stilajn fundamentojn de esperanto, estas bona helpilo por kursoj kaj memstudo. Liveras: Jar.Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

- -

ESPERANTISTA SOMERO 1954 EN ĈSR.

La somera vivo esperantista en nia lando denove estos vigla en la nuna jaro. Ni donas ĉi tie por la interesiĝantoj tabelon de aranĝoj:

- 5.7.-15.8.: Esperantista studtendaro junulara en arbaroj ĉe rivero Moravice en tri etapoj 14-tagaj.
- 18.7.-31.7.: Somera Esp. kursaro "Theodor Čejka" en Příbor sub Beskidoj.
- 25.7.- 7.8.: Somera Kolegio de Esperanto en Doksy kun Floraj Ludoj kaj aliaj kromaranĝoj.
- 1.8. : Landa jarkunveno de Esperantista Junularo en Hradec u Opavy.
- 8.8.-15.8.: Kultura Esperanta Seminario kun distra programo en kastelloko Kost (Ĉeĥa paradizo).
- 11.9.-12.9.: Tutŝtata kongreso de ĉsl. esperantistoj en Otrokovice. Temo unuataga "Esperanto-literaturo", duataga: "Per Esperano al tutmonda paco."

Ebleco de elekto estas riĉa kaj ĉiu decidiĝu laŭ siaj emo kaj eblo. Detalojn ni jam anoncis en antaŭaj Bultenoj.

- -

ESPERANTAJ KANTOJ EN LA DOMO DE ARTISTOJ EN PRAHA. La 19an de junio okazis en Domo de Artistoj (iama Rudolfinum) koncerto, en kiu oni prezentis komponaĵojn de profesoroj de konservatorio en Praha. Riĉenhava progamo aŭdigis al la aŭskultantoj komponaĵojn de ses aŭtoroj. Grandan atenton vekis tri kantoj - poemoj de K. Kalocsay, muzikigitaj de proferoso Štěpán Urban. Profesorino V.Linhartová, kvankam neesperantistino, prezentis la kantojn en tre bona esperanto. Ni sincere gratulas al s-ino Linhartová pro tiu ĉi sukceso. La enhavon de la kantoj kaj la fakton, ke ili estas prezentataj en originala - do esperanta lingvo - oni speciale akcentis. Dankegon al nia Štěpán Urban!

- -

EKP

BLINDULPRESA NOVELDONAĴO.

Okaze de la momorjaro pri Antonín Dvořák, la mondfama muzikkomponisto (mortis 1.5.1904) eldonis blindaj samideanoj brajlpresse liajn Bibliajn Kantojn. Tiun ĉi ciklon de 10 kantoj por sola voĉo kun akompano de piano, laŭ "Psalmaro" tradukita de L.L.Zamenhof kaj originale verkita laŭ ĉeĥa teksto de la "Psalmaro" de Antonín Dvořák, aranĝis por la blindula Esperanto-eldono Dro Josef Fousek.

La 10paĝa eldonaĵo estas sendota senpage al ĉiuj abonantoj de "AŬRORO", nia blindulpresa E-revuetto, kune kun ĝia 3a numero ekspedota en Julio.

"AŬRORO" aperanta jam la 28an jaron, havas nun 63 enlandajn abonantojn kaj estas sendata al 45 legantoj en 23 aliaj landoj, senpage. La dua numero estas jam en iliaj manoj. Ĝi enhavas ree la regulajn rubrikojn La Paco, La Movado, "Amu Ĉeĥoslovakion!" (ĉi-numere pri la malfacila poresp. laboro en nia lando), El Mondliteraturo (ĉina poezio), Stenografia angulo (Por kompreni Hindujojn ...), Popularaj Kantoj ("Ne koleru, panjo kara ..." teksto kaj melodio), El Scienco (La sekreto de mara fundo), Nia leterujo. La Aŭroro-klubo (libera tribuno de legantoj).

- -

DOMSIGNOJ.

Ĉu ne estas en via urbo domoj kun interesaj antikvaj signoj, ekz. "Du Negroj", "Ora Hufofero" k.s.? Se estas tiaj, sendu ilian priskribon (laŭeble kun bona fotobildo) al s-o H.W.Alings, Middenweg 226, AMSTERDAM O, Nederlando. Donu ĉiujn indikojn pri la signo kaj pri la domo, informu, ĉu estas sur ili notita jaro, diru nomon de la strato kaj domnumeron, citu historion de la domo, se ĝi estas al vi konata. Se vi ne aldonas bildon, donu precizan priskribon de la signo. Se vi havas gazetartikolon pri tiu signo, almetu ĝin, ĝi povas esti ankaŭ en ĉeĥa aŭ slovaka lingvoj. Se estas en via urbo tro multe da tiaj signoj, informu almenaŭ pri la plej interesaj. La nomita nederlanda samideano, aŭtoro de libro pri tiu ĉi fako, preparas nun novan ampleksan verkon pri domsignoj en la tuta mondo kaj ni petas ĉiujn legantojn de la Bulteno, ke ili kunlaboru. Ĉar sendube amasiĝos multege da materialo, la kontribuantoj ne atendu dankon nek korespondu pri aliaj temoj, sed ili estu kontentaj, ke ili povas pruvi valoron de nia lingvo por serioza scienca laboro. Tiu ĉi alvoko ne koncernas la urbon Praha, kie la Esperantista klubo mem liveros la necesan materialon!

- -

INTERNACIA KONKURSO.

Premio 25 Dolaroj. Esperanto-Asocio de Nov-Ĵerzio, filio de EANA, donos premion de 25 usonaj dolaroj por la plej bona letero, kiu respondos "KIAL LA UNUIĜINTAJ NACIOJ BEZONAS ESPERANTON?" La letero ne enhavu pli ol 500 vortojn kaj atingu Usonon antaŭ la 15a de septembro 1954. Adreso: Esperanto-Asocio de Nov-Ĵerzio, 448 South Orange Ave, NEWARK, N.Y. Usono.

- -

XVa HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

en Zaragoza okazas de la 24a ĝis 27a de julio. Bela kolora afiŝo de tiu ĉi kongreso estis admirata dum niaj kunvenoj. Esp. klubo en Praha sendas al la kongreso siajn plej korajn salutojn.

- -

SALUTO EL FINNLANDO.

Samideanino Elmi Taminen, Kirjatyöntekijänk 4A Helsinki, salutas per tiu ĉi vojo siajn multajn gekonatulojn en Ĉeĥoslovakio.

- -

SVEDA ŜLOSILO DE ESPERANTO

aperis en 17a eldono. Ĝis nun estis sume presitaj 230 000 ekzempleroj.

- -

BIBLIO EN ESPERANTO,

kiu estis disvendita, aperos denove. La Brita Biblia Societo anoncas baldaŭan eldonon de 2500 ekzempleroj.

- -

TUTŜTATA KONFERENCO EN PŘEROV 22.-23.5.1954

Ni ricevis post apero de nia raporto la informon, ke la sabatan festan vesperon partoprenis 260 p., la dimanĉan kunvenon preskaŭ 200 p. el la sekvantaj lokoj: Bohumín, Brno, České Budějovice, Dolní Čermná, Dolní Duchá, Drahotuše u Hranic, Gottwaldov-Otrokovice, Hluk, Hranice, Hulín, Jakartovice, Jeseník, Karlovy Vary, Karviná, Kojetín, Kopřivnice, Košice, Kroměříž, Kyjov, Kyjovice, Lanškroun, Lanžhot, Liberec, Lipník, Milenov, Olomouc, Opava, Ostrava, Plumlov, Počepice, Poprad, Praha, Prosenice, Prostějov, Předmostí u Přerova, Přerov, Příbor, Radvanice, Šumperk, Troubelice, Třebíč, Třinec, Uherské Hradiště, Val.Meziříčí, Vrútky, Zábřeh.

- -

SE VI VOLAS DISVASTIGI SCIIGON

inter ĉeĥoslovakaj esperantistoj, uzu la servon de nia Bulteno. Donu al ni ĉiam ĝustatempe (!) koncizan informon kaj ni publikigos ĝin kun plezuro senpage en nia Bulteno, kiu disiras al 800-900 adresoj. Ni povas ankaŭ almeti flugfoliojn, ne tro pezan. Uzu tiun ĉi okazon, precipe ĉiuj aranĝantoj de kunvenoj.

- -

KIE VI POVAS LEGI "HEROLDON DE ESPERANTO"? (Daŭrigo el Bulteno nro 15.)

En la sekvantaj lokoj vin turnu al tie notitaj samideanoj, kiuj certe volonte disponigos al vi tiun revuon, eĉ se ili estas dumvivaj abonantoj aŭ se la abono por ili estis pagita en eksterlando.

Běšiny u Klatov: Josef Zdeněk - České Budějovice: ankaŭ prof. Vl. Vurm, Doudlebská 896 - Hronov: Jar. Novák, Padolí 297 - Chotěboř: Dr. Stan. Kamarýt - Chrastava u Liberce: Lad. Mlejnek, Vítkovská 176 - Jablonec n.Nisou: Emil Mai, Máchová 11 - Karlovy Vary: Petr Tichota, Nejdecká 56 - soldatoj ĉe Lad. Fogl, vojín, PA 227, S/12 - Kladno: Božena Vlčková, Dubí 3/710 - Kolín: Jan Janda, Dobrovského 272 - Kutná Hora: prof. Josef Kožený, industria lernejo - Lanškroun: N. Jirečková, Školní 128 - Liberec: inĝ K Fanta, Na Bojišti 14, JUDr. Boh. Jakerle, Bendlova 13a, Frant. Pytloun, Leninova 518/IV. - Litomyšl: Karel Pič - Litvínov: Karel Pastor, Rooseveltova 646 - Mariánské Lázně: Josef Kaplánek, Husova 2 - Mladá Boleslav: Karel Toman, Podchlumí 94 - Modřany u Prahy: Alois Zedník, nro 1482 - Most: Otakar Venda, Rudolice, nám. svobody 23 - Náchod: Josef Bureš, Dolní Radechová - Nová Paka: T.M.Bohun, Klášterní 633 - Nová Role u Karl.Varů: Dr. Frant. Vaněk - Nové Město nad Metují: Ant. Kodýtek, Krčín 108.

(Daŭrigo sekvos)

- -

MONDVOJAĜANTO PRI ESPERANTO.

Kiam la kaŭkazano dro Merabi volis viziti Etiopion, li elŝipiĝis en la franca afrika haveno Dĵibuti. Lia atendo, ke li renkontos afrikan ekzotikon, estis trompita. En Dĵibuti estis hoteloj, aranĝoj kaj la tuta vivo pure eŭropmanieraj. La Etiopia konsulo parolis france kiel Parizano. Se Dĵibuti volas esti absolute laŭtempa, kial oni ne parolas tie Esperanton? (El la vojaĝlibro de dro Merabi laŭ citaĵo en "New Times and Ethiopian News 16.5.1953.)

- -

LA MARBORDON ĈIRKAŬ ETNA

en la provinco Catania en orienta Sicilio priskribas ĉarma flugfolio kun multkoloraj bildoj, agrablaj por okulo kaj kun senriproĉa Esperanto-teksto. La flugfoliojn vi povas havi, se vi ĝin petos en Ente Provinciale Turismo, Catania (Italio).

- -

9a nro de "HEROLDO" ne alvenis en nian landon. Bonvolu do ne reklamaci ĝin!

- -

Pro vere bonaj programoj multaj gesamideanoj regule vizitas niajn klubajn vesperojn. Ĉu ankaŭ vi estas inter ili?

- -

LA FILATELISTO

estas monata revuo, aperanta jam kvaran jaron en Francio. Venis en niajn manojn 20-paĝa multobligita kajero. Ĝi alportas multe da interesa materialo por ĉiu kolektanto de poŝtmarkoj. Provnumero estas ricevebla senpage de la redaktoro J. Coste, 2, Square des Aliscamps, Paris 16-e, sed vi povas ĝin ankaŭ aboni sendante Kĉs 6,20 kontante en letero al nia membro J.V.Haering, Nad Král. oborou 43, Praha 7. Se estas por vi pli simple pagi al la klubo, uzu nian pagilon kaj sendu per ĝi Kĉs 6,50. Ni tuj transdonos vian abonon al la peranto s-o Haering.

- -

"ESPERANTLINGVAN" KUDROMAŜINON

fabrikas la italoj. Al du novaj modeloj ili donis la nomojn "Mira" kaj "Nova". Ni aldonas, ke la ĉeĥoslovaka kompanio Koh-I-Noor eksportas kudrilojn sub la esperanta nomo "Akra".

- -

SOLVU TIUN ĈI MALFACILAN PROBLEMON!

La oficistoj de la popolregistrejo de la sudafrika ĉefurbo KAPURBO havas multajn zorgojn pro la fakto, ke negroj kutimas doni al siaj infanoj nomojn de monatoj. Ekzemple la 17jara Siena Februaro, filino de 40jara Januaro kaj de la 36jara Siena Oktobro edziniĝis en aŭgusto 1950 al Julio Septembro. Ĉi tiu Julio Septembro mortis en novembro samjare, sed en decembro, tuj post la morto de Julio Septembro ŝi edziniĝis al sinjoro Junio Aŭgusto. Nun oni ne scias ĉu la malgranda Aŭgusto, kiu naskiĝis en la fino de aŭgusto 1951, estas filo de Julio Septembro aŭ de la dua edzo Junio Aŭgusto. Vere malfacila tasko por la oficistoj de la nomita grandurbo.

Laŭ "La Praktiko"

- -

LA KONDAMNO DE MILITO

kaj la postulo al amo inter la homoj estas multe pli aĝa ol la kristana religio. En la libro "Tao-teh-king", la sola verko, kiun skribis la granda ĉina filozofa Lao-tse (6a jarcento antaŭ Kristo) troviĝas ekz. jenaj vortoj: "La armiloj estas iloj de malfeliĉigo kaj neniam ilon por nobla homo, kiu uzos ilin nur, se li estas nepre devigata. Ĉar por noblulo trankvilo kaj paco estas la plej altaj bonoj, kaj li ne ĝojos eĉ pri sia venko; ĉar tio estus ĝojo pri hombuĉado!"

- -

PRI STA HELENA

Kiam en la jaro 1501 oni trovis la insulon Sta Helena, ĝi havis 61 specojn de plantoj, kiuj - escepte de du - ne estis troveblaj en iu ajn alia regiono de la mondo.

- -

LA FLUGADO DE LA SUNO

Nenio staras senmova en la universo, sed ĉio moviĝas, eĉ nia suno. Ĝi kaj kun ĝi ankaŭ ĝia tuta planetaro traflugas en ĉiu sekundo 57 kilometrojn, verŝajne en la direkto al la stelgrupo Herkules.

- -

EL INFANAJ TRAKTAĴOJ:

La ĉevalo havas kvar krurojn, po unu ĉe ĉiu angulo.

La homa korpo estas norde limigita de la kolo.

La ŝafo ĝojigas nin eĉ ankoraŭ post sia morto per la ĉarmaj sonoj de siaj intestoj.

Kiam ni rigardas la voston de rano, ni rimarkas, ke ĝi havas neniun.

En antikvaj tempoj la homoj ordinare atingis tre grandan aĝon, ĉar la medicina scienco estis ankoraŭ tre primitiva.

- -

Proksima numero aperos komence de septembro.

Eldonkvanto: 1000 ekzempl.

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

LITERATURA ALDONO

August Strindberg: Duonfolio da papero.

Tradukis Gösta Henriksson

Enkonduko:

La fama verkisto kaj dramisto August Strindberg, kiu vivis dum la jaroj 1859-1912, estas la giganto en la sveda literaturo.

Li estas la titano, kiu ribelas kaj batalas kontraŭ homaj problemoj, la grandaj homaj konfliktoj.

Sed en lia ampleksa verkaro troviĝas ankaŭ etaj skizoj plenaj de beleco kaj varmaj sentoj.

La lasta transportveturilo estis for; la antaŭa luanto, juna viro kun nigra rubando ĉirkaŭ la ĉapelo iris ankoraŭ unu fojon tra la malplenaj ĉambroj por vidi, ĉu li ne forgesis ion. Ne, li ne forgesis ion, absolute nenion; kaj poste li iris en la koridoro kun firma decido ne plu pensi pri tio, kion li travivis en tiuj ĉi ĉambroj. Sed vidu: en la koridoro apud la telefono estis duona folio da papero fiksita sur la muro per najletoj; ĝi estis plenskribita per multaj stiloj, parte per inko, aliparte per krajono. Tie li trovis, kvazaŭ respegulita, la tutan belan historion, kiu pasis dum la mallonga tempo de du jaroj. Ĉion, kion li volis forgesi, li trovis tie. Peco de homa vivo sur duona folio da papero. Li prenis la folion. Estis tiu sunflava papero, kia preskaŭ brilas de si mem. Li metis ĝin sur la salonan kahelfornon, klinis sin super ĝi kaj legis:

Estis unue ŝia nomo: Alice, la plej bela nomo, kiun li tiam sciis, ĉar ĝi estis la nomo de lia fianĉino. Kaj la telefona numero - 1511. Estis preskaŭ kiel psalmo en la preĝejo. Sub ĝi estis skribita: La banko. Estis lia laboro, la sankta laboro, kiu donis panon, hejmon kaj edzinon, la fundamento de lia ekzistado. Sed ĝi estis trastrekita! Ĉar la banko faris bankroton, sed li savis sin en alian bankon, tamen, post tempeto de granda maltrankvilo. Jen sekvas aliaj nomoj: La florvendejo kaj la droŝkisto. Estis la gefianĉiĝo, kiam li havis la poŝon plena de mono. Poste: la meblovendisto, la tapetisto. La nova hejmo estas preta. La transportoficejo; ili endomiĝas. La biletejo de la Opera Teatro: 5050. Ili estas novgeedziĝintaj, kaj iras en la Opera-Teatron ĉiudimanĉe. Iliaj plej bonaj tempetoj, kiam ili mem sidas silentaj kaj renkontiĝas en beleco kaj harmonio en la fabellando de la alia flanko de la kurteno. Ĉi tie sekvas vira nomo, kiu estas trastrekita. Estis amiko, kiu atingis certan pozicion en la socio, sed kiu ne povis porti tiom da feliĉo, li falis senhelpe kaj devis vojaĝi malproksimen. Tiel malfortaj estas ni homoj!

Nun ŝajnas esti io nova en la vivo de la geedzoj. Per virina mano kaj krajono estas skribita la vorto: "La sinjorino." Kiu sinjorino? - Jes, tiu kun la granda mantelo kaj la afabla vizaĝo, kiu venas tiel silente kaj neniam iras tra la salono, sed tra la koridoro al la dormoĉambro. Sub tiu nomo estas alia: D-ro A. Unuafoje montriĝas la nomo de parenco. Li legas: "Panjo." Estas la bopatrino, kiu diskrete restis for por ne ĝeni la geedzojn, sed nun estas vokata en la momento de danĝero, kaj venas kun ĝojo, ĉar ŝi estas bezonata. Ĉi tie komenciĝas skribaĉo, blua kaj ruĝa. La komisia kontoro: la servistino finis sian servon, nova estas serĉata. "La apoteko!" Ho! Mallumiĝas! La laktejo, oni mendas lakton, sentuberklan. La vendejo, la buĉisto kaj ceteraj. Oni komencas prizorgi la hejmon per telefono. Tiam la mastrino certe ne estas en sia ĝusta loko. Ne! Ĉar ŝi kuŝas en la lito, malsana. Tion, kio poste sekvis, li ne povis legi, ĉar antaŭ liaj okuloj mallumiĝis tiel, kiel mallumiĝas antaŭ la dronanto en la maro, kiam li rigardas tra la sala akvo. Sed sur la papero staris la vortoj: "La enteriga entreprenejo." Sufiĉas! Unu granda kaj unu malgranda, subkomprenite, ĉerkoj. Kaj en parentezo estis skribita: "En tero." Poste estis nenio pli. Per tero finiĝis ĉio. Kaj tio estas vera.

Sed li prenis la paperon, kisis ĝin kaj metis en sian brustpoŝon. Dum du minutoj li travivis du jarojn de sia vivo. Li ne estis klinita pro sufero kiam li foriris, male, li portis sian kapon alte, kiel feliĉa kaj fiera homo, ĉar li sentis, ke li tamen posedis la plej belan en la vivo. Kiom da kompatindaj homoj en la mondo, kiuj neniam posedis tion!